# HELPO POR SERĈADO EN BITOTEKO

## Enhavo

HELPO POR SERĈADO EN BITOTEKO ........ 1
Simpla serĉo ........ 2
Rezultoj en Europeana ........ 2
Rafinita serĉo........ 3
Serĉo tra la indeksoj ........ 5
Bulea serĉo ........ 8
Ŝerĉkonsiloj ........ 9

## Simpla serĉo


Por fari ĝeneralan serĉon en Bitoteko sufiĉas tajpi la serĉ-terminon en la serĉilo kaj alklaki la koncernan butonon  (lupeo).




Tiu termino estas serĉata en ĉiuj metadatenoj kaj en la kompleta teksto de la dokumentoj.

La rezultoj montriĝas sur la ekrano *Serĉu* kaj en ili aperas per grasaj litertipoj la serĉitaj terminoj.









Eblas orgidi la rezultojn laŭ diversaj kriterioj kaj indiki, kiom da rezultoj po paĝo oni deziras vidi, malfermante la menuon per alklako en la butono kun formo de dentrado.

## Rezultoj en Europeana

Kiu ajn el la ĝeneralaj serĉoj faritaj en Bitoteko, donas rekte rezultojn ankaŭ en Europeana. Supre de la serĉilo, aperas la simbolo de Europeana kaj la nombro de dokumentoj respondaj al tiu serĉo, ne nur el Bitoteko, sed ankaŭ el aliaj institucioj partoprenantaj la projekton.




Rimarku, ke la granda diferenco inter la rezultoj atingitaj en Bitoteko (1659) kaj la rezultoj en Europeana (49), kiu inkluzivas tiujn de Bitoteko, ŝuldiĝas ĉefe al tio, ke Bitoteko serĉas la terminon ankaŭ en la teksto de la dokumentoj, dum Europeana nur mastrumas la metadatenojn (titolo, aŭtoro, temo…), kie la koncerna termino troviĝas.

## Rafinita serĉo

Eblas rafini la serĉon per specialaj filtriloj:











Se al la antaŭa serĉo *(Ruĝa Kruco)*, kiu redonis 132 rezultojn, ni aldonas la filtrilon, ke la metadateno *aŭtoro* enhavu la terminon *Rodríguez* la rezultoj limiĝos al nur unu.








Eblas aldoni tiom da filtriloj, kiom bezonate. Por ke la filtriloj funkciu, ne forgesu alklaki la butonon *Apliku*.



Se oni deziras serĉi nur en difinita sekcio aŭ kolekto, oni aliras la ekranon de tiu sekcio aŭ komunumo, tajpas la serĉterminon en la serĉilo kaj alklakas la butonon *Ek.*









La cetero funkcias tute simile al la antaŭe priskribita proceduro pri la ĝenerala serĉo, sed la rezultoj koncernos nur la elektitan sekcion aŭ kolekton.

Ankaŭ eblas serĉi en difinita sekcio aŭ kolekto per la ĝenerala serĉilo, elektante respektive la opcion *Ĉi tiu sekcio* aŭ *Ĉi tiu kolekto*, kiu aperas enirinte la ekranon de la sekcio aŭ kolekto celataj.








Krome, la serĉilo enhavas ortografian korektilon, kiu montras la mesaĝon *Ĉu vi celas…?:* kaj proponas la ĝustan terminon per kiu oni povas relanĉi la serĉon.






## Serĉo tra la indeksoj

Eblas komenci la serĉadon tra la diversaj indeksoj, kiujn proponas la menuo aperanta en la maldekstra flanko de la ekrano: *Sekcioj & Kolektoj, Aŭtoroj, Titoloj, Temoj kaj Specoj de dokumentoj.*




La indekso **Sekcioj & Kolektoj** permesas esplori la listojn de sekcioj kaj kolektoj de Bitoteko, kiuj estas ordigitaj laŭ alfabeta ordo.





Ene de ĉiu kolekto, ankaŭ eblas navigi tra la indeksoj kaj fari simplan serĉon.






**Aŭtoroj** permesas trairi la alfabetan liston de la diversaj aŭtoroj, kies verkoj troviĝas en Bitoteko. Interkrampe aperas la nombro de rikordoj ligitaj al tiu aŭtoro.





Eblas salti al difinita punkto de la listo elektante literon aŭ tajpante la nomon aŭ la unuajn literojn de la serĉata nomo.



Alklakante la deziratan aŭtor(in)on oni ricevas la liston de ŝiaj aŭ liaj verkoj.




GRAVE: Post la atingo de rezultoj, se oni deziras fari novan serĉon, oni devas rekomenci elektante la indekson en la indeksomenuo. Male, la serĉo ne bone funkcios.

La indekso **Titoloj** permesas trairi la alfabetan liston de verkoj, kiuj troviĝas en Bitoteko.

La indekso **Temoj** permesas trairi la alfabetan liston de la temoj rilataj al la verkoj, kiuj troviĝas en Bitoteko. Interkrampe, la nombro de rikordoj ligitaj al tiu temo.

La indekso **Specoj de dokumentoj** permesas trairi la alfabetan liston de la diversaj tipoj de dokumentoj, kiuj troviĝas en Bitoteko. Interkrampe, la nombro de rikordoj ligitaj al tiu tipo.

Funkciado de tiuj indeksoj similas al tiu jam priskribita por la indekso Aŭtoroj.

## Bulea serĉo

Eblas uzi buleajn operaciojn en la serĉiloj. Oni skribu ilin nepre **majuskle**:

- AND (kaj): Limigas la serĉon trovante nur tiujn erojn, kiuj enhavas la terminojn kombinitajn per tiu operacio. Ekzemple: *poemoj AND Fernández* (redonas ĉiujn dokumentojn, kiuj enhavas ambaŭ vortojn). Ankaŭ eblas rekte uzi la signon (+). Ekzemple: *poemoj +Fernández* (atentu, ke ne estu spaco inter la signo kaj la dua termino).
- OR (aŭ): Ampleksigas la serĉon trovante tiujn dokumentojn, kiuj enhavas unu el la du terminoj kombinitaj. Ezemple: *poemoj OR Fernández* (redonas ĉiujn erojn, kiuj enhavas almenaŭ unu el la du vortoj). Ĝi egalas al tio, skribi *poemoj originalaj*, kaj estas la implicita serĉo-formo de Bitoteko.
- NOT (ne): Ekskludas el la serĉo la terminojn skribitajn post tiu operacio. Ekzemple: *poemoj NOT Fernández* (redonas ĉiujn erojn, kiuj enhavas la terminon *poemoj* sed ne la terminon *Fernández*). Ankaŭ eblas rekte uzi la signon (-). Ekzemple: *poemoj -Fernández* (atentu, ke ne estu spaco inter la signo kaj la dua termino).
- Parentezoj permesas grupigi pluraj serĉterminojn kaj eblas apliki la operaciojn al tiuj grupigoj. Ekzemple: *(poemoj OR teatraĵoj) NOT (Fernández OR Moinhos)*.
- Serĉado de frazoj: Por serĉi konkretan frazon oni uzu citilojn: *"deklamas la poemon"*.

- Trunkado: Por trovi ĉiujn erojn, kiuj enhavas vortojn kun difinita prefikso, oni devas uzi asteriskon (*) malantaŭ ĝi. Ekzemple: *musik** (ĉi kombino serĉos la vortojn *muziko, muzika, muzikisto*, ktp.)

## Ŝerĉkonsiloj

Foje, oni bezonas trovi dokumenton kun relative longa titolo, kiun oni kredas koni ekzakte, sed vere oni nur parte rememoras ĝin. Se en tiuj kazoj oni serĉas la kompletan titolon uzante la filtrilon ES, probable la rezulto estos nula, ĉar minimuma modifo en la serĉita titolo (kroma spaco inter du vortoj, forigo aŭ aldono de komo, ktp.) donos nulan rezulton.

Estas preferinde serĉi la dokumenton pere de la indekso *Titoloj*.

Se oni nur memoras certan karaktro-ĉenon de la titolo, eblas serĉi tiun parton intercitile, per la ĝenerala serĉilo. Kompreneble, ankaŭ eblas mistajpi tiun intercitilan ĉenon, kaj tiam la serĉrezulto estos ankaŭ nula.

La plej efika maniero, kvankam ja malpli tuja, estas enkonduki sinsekve plurajn filtrilojn *Titolo*, kun la opcio *Enhavas*, por rafini iom post iom la nombron de rezultoj trovitaj de la serĉilo.